
# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2018-01-13 n-ro 415

## Ni fine havas senperan pruvon ke homa agado povas resanigi la Ozonan truon



Migrantoj: Grekio kaj Unuiĝintaj Nacioj postulas pli da eŭropa solidareco

Dotita (Gifted): historio pri nefermita geŝtalto

Malsama reago de la virinaj kaj viraj cerboj je streso

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

## Migrantoj: Grekio kaj Unuiĝintaj Nacioj postulas pli da eŭropa solidareco
*Translokado de la azilpetantoj al aliaj eŭropaj landoj p. 03*

## Jen nova katoraso iom aspektanta kiel homlupo
*Lykoi p. 04*

## Hodiaŭe
*Julio Baghy; kaj Grekio p. 04*

## Malsama reago de la virinaj kaj viraj cerboj je streso
*Neŭropsikiatriaj kaj endokrinologiaj ekzamenoj necesas konsideri diferencojn inter la seksoj p. 05*

## Ĉeĥoj dubas pri ĝenerala malpermeso de fumado
*Malforta aplikado de la malpermeso de fumado p. 06*

## Ni fine havas senperan pruvon ke homa agado povas resanigi la Ozonan truon
*Ĥemia konsisto interne de la ozona truo p. 07*

## Dotita (*Gifted*): historio pri nefermita geŝtalto
*Infano ne estas kopio de sia prauloj p. 08*



# Migrantoj: Grekio kaj Unuiĝintaj Nacioj postulas pli da eŭropa solidareco

La ekvilibro estis establita en Ateno ĉimardon la 9-an de januaro, koncerne la translokadon de la azilpetantoj al aliaj eŭropaj landoj. Temo, kiu okazigas debaton ene de Eŭropa Unio. En daŭro de du jaroj, 32 000 personoj estis senditaj al tuta Eŭropo el Italujo kaj Grekujo, inter kiuj 22 000 al Grekujo. La grekaj aŭtoritatoj kaj la Alta Komisaro de UN postulas daŭrigon de la solidareco inter eŭropaj landoj.

En Ateno, Iannis Mouzalas, la greka ministro pri migrado, establis la ekvilibron de la programo de translokadoj. Sed dum la diskutoj daŭras por revizii la Eŭropan sistemon pri dispartigo de la azilpetantoj, li esprimis sian timon pri la lastaj proponoj de Donald Tusk. En decembro, la prezidanto de la Eŭropa konsilio fakte proponis nuligon de la rifuĝintaj kvotoj.

«Mi esperas, ke la Komisiono kaj la Eŭropa parlamento kontraŭstaros tiujn proponojn, kiuj endanĝerigas la fundamentojn, sur kiuj konstruiĝis Eŭropa Unio. La solidareco en Eŭropa Unio ne estas bonvoleco, ĝi estas leĝa devigo», li deklaris.

Grekujo estas aparte koncernata. Sen tiuj kvotoj ĝi timas, ke la nombro da landoj, kiuj rifuzas akcepti rifuĝitojn plinombriĝu. Ankaŭ Philippe Leclerc, respondeculo en Grekujo de la Alta Komisaro de UN por la rifuĝintoj, pledis por pli da solidareco: «Ni esperas, ke la reformo de la regularo Dublino ebligos, okaze de amasa alveno, ke antaŭvidebla sistemo stariĝos kun partopreno de ĉiuj ŝtatmembroj, kiuj akceptos la azilpetantojn».

La landoj de la Visegrada grupo, t.e Ĉeĥa Respubliko, Pollando, Hungario kaj Slovakio proponas financan helpon al la enirlandoj de rifuĝintoj en Eŭropa Unio, sed plu rifuzas akcepti ilin sur sia teritorio, kadre de la translokigoj.

Neniam Milito Inter Ni

# Jen nova katoraso iom aspektanta kiel homlupo

Merkrede, la 10-an de januaro, kadre de evento aranĝita de la usona organizaĵo pri hundoj AKC (angla mallongigo pri *American Kennel Club*), la internacia asocio pri katoj TICA (angla mallongigo pri *The International Cat Association*) prezentis novan specon de kato, kies oficiala nomo estas *"Lykoi"* ("lupo" en la greka lingvo).



Gena mutacio en la katoj de tiu speco igis mallongaj iliajn hararojn ĉe kelkaj korpopartoj, estigante kvazaŭ maskon similan al muzelo, okulojn kaj orelojn, kiuj kune kun la nigra hararo kaj oraj okuloj koincide ŝajnigas ilin al la trajto elektita de Holivudo kiel la aspekto por la homlupoj.

Male al katoj kiel *"Perfold"* kiuj reliefiĝas en interreto, tiuj *"Lykoi"* ne estis gene modifitaj, kaj ties natura mutacio oni ekrimarkis de antaŭ 20 jaroj.

*"Lykoi"* estas tre inteligenta kato. Ĝi lertas je defiaj ludoj. Foje ili faras hundajn agojn, kaj ili kutime ĉasas kaj persekutas kiel lupoj", tion asertas TICA-retejo.

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog



## Julio Baghy

**Julio Baghy, originale Baghy Gyula (**[ˈbɒgi ʝulɒˈ ]**), pseŭdonime Jobo kaj Paĉjo), (naskiĝis la 13-an de januaro 1891 en *Szeged*, mortis la 18-an de marto 1967 en Budapeŝto) estis verkisto kaj aktoro. Naskita en Hungario, li lernis Esperanton en 1911 kaj komencis sian laboron por la Esperanto-movado dum sesjara milita kaptiteco en Siberio. Elstara movadano kaj Esperanto-instruisto. Iama vicprezidanto de la Akademio de Esperanto.**

**En Esperanto aperis pluraj verkoj.**

**Vikipedio**




## Bildo de la tago

***Moni Agios Triadas,***

***Meteora*, Grekio.**

**Vikipedio**



# Malsama reago de la virinaj kaj viraj cerboj je streso

Sciencistoj el *Rockefeller*-universitato en Novjorko rimarkis evidentajn diferencojn en la reago je genostreso en la virinaj kaj viraj cerboj. Esplorante cerbodiferencojn ili koncentriĝis pri la spaco CA3 de la hipokampo, kiu ludas ŝlosilan rolon en tiaj procezoj, kiel reago je streso, memorlaboro, reguligado de animagordo kaj informalifarado.

En ilia eksperimento la musaj femaloj kaj maskloj estis dum 6 minutoj subigataj al streso en la formo de truda naĝado. Sekve estis kontrolata la reago de iliaj neŭronoj kaj genoj en la spaco CA3. Ĉe la femaloj la stresa situacio influis pli da genojn ol ĉe la maskloj en la rilato 6472 je 2474. Laŭ la usonaj sciencistoj, tiom granda diferenco sugestas, ke reage je streso esencan rolon plenumas la genetika materialo. Genoj en la cerboj de femaloj reagas je mediaj stresofaktoroj en multe pli granda grado ol ĉe maskloj. Daŭrigante la esplorojn la sciencistoj identigis 1842 genojn reagantajn je stresoj kaze de ambaŭ seksoj. Evidendiĝis, ke ili funkcias kontraste. Genoj atakitaj de streso ĉe femaloj estis blokataj ĉe maskloj kaj inverse. Esploristoj faris ankaŭ eksperimentojn kun musoj havantaj la varianton de la geno BDNF, kiu ĉe homoj grandigas la riskon de neŭropsikaj malsanoj provokitaj de streso. Pluraj testoj elmontris, ke femaloj – eĉ en senstresa stato – malpli bone solvis testojn pri spaca memoro dum maskloj havis kun tio neniujn poblemojn. Tio – laŭ esploristoj – povas ligiĝi kun interago de la genetika materialo kun femalaj sekshormonoj.

Laŭ la aŭtoro de la analizo, doktoro Jordan Marrocco, en la neŭropsikiatriaj kaj endokrinologiaj ekzamenoj necesas konsideri diferencojn inter la seksoj. Ekzemple la farmacia industrio testante medikamentojn ĉefe ĉe viroj devas preni en konsideron riskon, ke ilia efikado povas esti malsama ĉe virinoj.

Pola Retradio

# Ĉeĥoj dubas pri ĝenerala malpermeso de fumado

Laŭ enketo, plimulto de la ĉeĥaj civitanoj pledas por pli malforta aplikado de la malpermeso de fumado. Fakuloj tamen kontraŭas tion.




Ekbruligi cigaredon ekde apenaŭ sep monatoj en ĉeĥaj trinkejoj kaj restoracioj ne plu estas permesite. Ankaŭ ĉe haltejoj de aŭtobusoj kaj tramoj kaj ĉe pluaj lokoj validas ekde la 31-a de majo ĝenerala malpermeso de fumado.

Kiam la novaj reguloj ekvalidis la plimulto de la ĉeĥoj subtenis tion. Meze de decembro ĉeĥa opiniesplora instituto faris reprezentan enketon pri la temo. La rezulto estas: 58 procentoj de la enketitoj pledus por mildigi la malpermeson de fumado. Sociologo de la instituto analizis la enketon:

"En la sondado antaŭ unu jaro la demando estis, ĉu oni pledas por la enkonduko de absoluta malpermeso de fumado. Tiam oni ne donis tamen la eblecon pledi por iom pli milda varianto de la malpermeso de fumado. Tion ni nun faris. Ankaŭ hodiaŭ nur tre eta malplimulto deziras kompletan nuligon de la malpermeso. Sed sufiĉe granda parto de la enketitoj inklinas al la varianto ke ekzemple por malgrandaj trinkejoj estu escepto."

Fakte kontraŭuloj de la malpermeso de fumado dum aŭtuno kolektis proksimume 23 000 subskribojn. Ili volas atingi ke la leĝo estu nuligata. Komence de decembro la senato de la Ĉeĥa Respubliko okupiĝis pri la koncernaj postuloj. Sed la supera ĉambro de la ĉeĥa parlamento voĉdonis kontraŭ la ŝanĝoj. La senatoroj kontraŭis ĉian mildigon de la malpermeso de fumado.

Ankaŭ la ministro pri sano same reprezentas tiun severan linion. La kostoj por malsanoj kiuj estas kaŭzitaj de la fumado superas, laŭ li, pli ol unu miliardon da eŭroj kaj proksimume 15 000 homoj ĉiujare mortas pro la sekvoj de fumado.

Multaj ĉeĥaj kuracistoj samopinias ĉi-koncerne kun la ministro pri sano. Jam nun estas observeblaj sukcesoj pro la malpermeso de fumado. La nombro de kormalsanoj malkreskas jam. Profitas ĉefe nefumantoj.

Sed kelkaj posedantoj de trinkejoj plendas pri malpli da gastoj kaj vidas la kaŭzon por tio en la malpermeso de fumado. Ili havas ankaŭ subtenantojn en la politiko. Ili pledas por zonoj de fumado en gastejoj. La nombro de fumantoj en Ĉeĥio ampleksas 2,5 milionojn da homoj.


Cetere ankaŭ en Aŭstrio ĵus okazas simila diskuto. La nova registaro volas mildigi la malpermeson de fumado en gastejoj kiu validos laŭ aktuala leĝa decido ekde majo de ĉi tiu jaro.

Ĉu la malpermeso de fumado en gastejo restu absoluta, tio nun en ambaŭ landoj estas disputata.

Jarka Malá
Esperanta Retradio

# Ni fine havas senperan pruvon ke homa agado povas resanigi la Ozonan truon

Laŭ Kosmofluga Centro *Goddard* [***G****oddard* ***S****pace* ***F****light* ***C****enter* - GSFC ] de NASA, sciencistoj unuafoje prezentis pruvon ke la resaniĝo de la ozona truo estas atribuebla al homa agado.



Ĉiun septembron la Antarkta ozona truo formiĝas post kiam la radioj de la Suno katalizas ozon- detruo-ciklojn. Tiuj cikloj engaĝas kloron kaj bromon, kiuj pleje venas el kloro-enhavantaj homfaritaj ĥemiaĵoj nome kloro-fluoro-karbonoj (KFK-j), kiuj estis malpermesitaj en 1996.

Antaŭa esplorado pri la ozono koncentriĝis sur la grandeco de la truo, sed por sia esploro, la GSFC-teamo fakte mezuris la ĥemian konsiston interne de la ozona truo.

Uzante Sondilon por Atmosferrandaj Mikroondoj [***M****icrowave* ***L****imb* ***S****ounder* (MLS)] en la Aura-satelito, la esploristoj povis mezuri kloridan acidon, kiu estas kreata kiam kloro, post kiam ĝi detruas la tutan haveblan ozonon, reakcias kun metano.

Ili konkludis ke kloraj niveloj malgrandiĝadis proksimume je 0,8 procentoj ĉiu-jare kaj rimarkis 20-procentan malgrandiĝon en ozona forkonsumo en la Antarkta vintro ol en 2005.

Susan STRAHAN, ĉefaŭtoro de la esploro kaj atmosfera sciencistino ĉe GSFC, diris en novaĵa komuniko: "Ni klare vidas ke la kloro el la KFK-j malpliiĝas en la ozona truo, kaj pro tio okazas malplia ozona forkonsumo.

La esploro estis eldonita en la jurnalo *Leteroj pri geofizikaj Esploroj*.

**Elimini KFK-jn**

Du jarojn post la malkovro de Antarkta truo en 1985, kelkaj landoj subskribis la *Montrealan Protokolon pri Substancoj kiuj Forkonsumas la Ozonan Tavolon*, serion da reguloj kiuj ekagis kontraŭ ozono-forkonsumaj kombinaĵoj.

Poste, al la protokoto estis aldonitaj amendoj por tute laŭgrade ĉesigi produktadon de KFK-j, kaj la esploristoj atribuas la malpliiĝon kiun ili observis al tiu ĉi internacia malpermeso.

STRAHAN diris: "[La 20 procenta malpliiĝo] estas ege proksima al kion nia modelo antaŭdiras ke ni devas vidi por tiu kvanto de klora malpliiĝo." "Tio donas al ni konfidon ke la malpliiĝo de la ozona forkonsumo tra mez-septembro montrita de la MLS-datumoj estas pro malgrandiĝantaj niveloj de kloro kiu venas el KFK-j."

Kvankam promesa, la batalo por renversi la damaĝon kiun ni faris al la planedo ne baldaŭ finiĝos.

Anne DOUGLASS, atmosfera sciencistino ĉe GSFC kaj kunaŭtoro de la raporto, diris: "KFK-j havas vivodaŭrojn de 50 ĝis 100 jarojn, do ili restadas en la atmosfero por tre longa tempo.Ni esperas ke la ozona truo foriĝos eble en 2060 aŭ 2080. Kaj eĉ tiam eble restos malgranda truo."

Tamen,jenaj lastatempaj eltrovoj pri grandeco de la ozona truo memorigas ke konsiderinda ago povas havi konsiderindan efikon.

Klimata ŝanĝo eble ŝajnas kiel problemo tro grava por realisme ĝin trakti, sed se ni povas malgrandigi ozonan forkonsumon en Antarktio pere de relative simpla paŝo - elimini KFK-jn, kiu scias kion ankoraŭ ni povus fari.

Tio ĉi artikolo estis originale eldonita de Futurism (vidu).

Fonto (angla): sciencealert.com

scienco.ir

---

# Dotita (*Gifted*): historio pri nefermita geŝtalto

Apenaŭ vi konas la usonan reĝisoron Marc WEBB, tamen mi rekomendas spekti tiun ĉi lian filmon, eĉ se vi ne estas zeloto de Chris EVANS. Ĝi prezentas ŝajne tre simplan, sed tiom ofte neglektatan, ideon – oni ne devas uzi infanojn por plenumi siajn revojn.

**Batalo por Mary ADLER**

Akso, ĉirkaŭ kiu turniĝas la tuta intrigo, estas sepjara knabino, orfiĝinta post kiam ŝia patrino, talenta scientistino, malsukcesis solvi la faman problemon de NAVIER–STOKES, al kiu ŝi dediĉis jarojn de sia vivo kaj desperiĝinte mortigis sin. Tio mem jam estas sufiĉa kialo por malfeliĉigi la junan estaĵon, sed tuj post la tragedio ŝi iĝas batalejo inter siaj patro kaj avino.

La patro estas simpla homo kies vivo estas iom loza kaj tute senambicia. Sed li amas sian filineton kaj pretas doni al ŝi ĉion, kion ŝi bezonas kaj deziras. La avino estas lia kontraŭaĵo, rigora kaj orgojla, ŝi kredas ke la ĉefa destino de ŝia nepino estas solvi la problemon, antaŭ kiu kapitulacis ŝia filino. Do ŝi insistas pri matematika lernejo, intenca trejnado ktp. La batalo daŭras kaj ardiĝas ĝis atingi juĝejon.

La dilemon komplikas evidentaj matematikaj talentoj, kiuj montras la knabino. En ordinara lernejo ŝi enuas, ĉar jam post kelkaj minutoj ŝi plenumas la taskojn, super kiuj ŝiaj samklasanoj umos la tutan lecionon. Do eĉ la instruistoj kaj direktorino insistas, ke ŝi frekventu specialan lernejon, anstataŭ vane malŝpari valoran tempon.

Do malfacilas klare decidi, kiu el la diskutantoj pravas – ĉu la avino, kiu deziras ke la nepino evoluigu kaj uzu siajn nedubeblajn talentojn, aŭ la patro kiu deziras ke ŝi simple estu feliĉa kaj ne perdu la infanaĝon pro la senĉesa lernado.

Mi pensas ke plejparto de la legantoj subtenos la patron aŭ almenaŭ miros pri la postulema avino, kiun ne haltigis eĉ la terora perdo de sia sola filino. Sed fine la reĝisoro donas al ni klarigon de ŝia konduto. Sed por ke mi pli bone komprenu ĝin, mi devas unue demandi: ĉu vi konas la *Zeigarnik*-efikon?

**Kelneroj kaj revoj**

Ŝia aŭtorino estis la germana studentino Bluma ZEIGARNIK, kiu rimarkis strangan aferon: kelneroj relative bone memoris la ankoraŭ nepagitajn mendojn, sed post ricevi la pagon tuj forgesis ilin, ne kapablaj rememori iujn detalojn. Kune kun sia instruisto, la fama germana psikologo Kurt

Lewin ŝi esploris tiun ĉi fenomenon kaj faris interesan konkludon: la neplenumita tasko estigas en la psiko streĉiĝon, kiu malaperas nur post ĝia plenumo.

Tiun streĉiĝon oni nomis *geschtalt* (de la germana bildo, imago) kaj ĝi iĝis bazoŝtono de la *geŝtalt*-psikologio. Kian praktikan signifon tio havas? La *geŝtalt*-psikologoj asertas, ke en la psiko de multaj homoj plu restas geŝtaltoj – la neplenumitaj deziroj kaj revoj, kiuj plu estigas streĉiĝon. Ili ne povas forgesi, nek plenumi ilin, kaj suferas pro tio. La psikologoj konsilas eltrovi tiun geŝtalton kaj likvidi, plenumi ĝin, sed ofte homoj mem faras tion – per siaj idoj.




Ĉu vi aŭdis frazojn kiel "Mi ne sukcesis iĝi kuracisto, sed mia filo sukcesos!", "Mi ne povis ludi violon, sed mia filino ludos" ktp? Jen tipaj ekzemploj de tia konduto – realigo de siaj deziroj per la infanoj. Ĉu indas komenti, ke tio plej ofte rezultas en fiaskoj, intergeneraciaj konfliktoj kaj distorditaj sortoj?

La menciita avino agnoskas fine, ke ŝi mem revis pri sciencista kariero kaj estis promesplena matematikistino, sed rezignis je ĉio por sekvi sian edzon al Usono kaj dediĉi sin al la familia vivo. Tiun ĉi "nefermitan" geŝtalton ŝi klopodis realigi unue per sia filino, poste per la nepino. Pro tio ŝi insistis kaj premis rigore, preta forpreni la knabinon el la manoj de la amanta patro. Ŝi batalis ne por feliĉo de la infano, sed por sia propra revo.

Infano ne estas kopio de sia praulo, nek devas esti – jen la ĉefa ideo, kiun mi vidis en la filmo. Ĉiu infano estas enigmo. Li aŭ ŝi venas de nenie kaj ni povas nur diveni – kia li aŭ ŝi estos? kion li aŭ ŝi ŝatos? kio igos lin aŭ ŝin feliĉa? Tasko de la gepatroj estas palpi liajn aŭ ŝiajn naturajn talentojn, evoluigi ilin, sed ĉiam memori ke nur ĝusta bilanco garantias la feliĉan vivon. Kiel trovi ĝin? Neniu havas recepton. Sed en serĉado oni devas ĉiam pensi nur pri la infano mem, forgesinte pri siaj propraj deziroj, preferoj kaj revoj. Ĉiufoje decidante ion rilate la infanon, oni devas demandi sin: ĉu mi faras tion por li/ŝi aŭ por mi mem?

Se vi ne sukcesis iĝi baletistino, frekventu dancokursojn aŭ spektu baleton en televido, sed ne turmentu vian idon per danclernejo. Donu al li aŭ ŝi eblecon provi ĉion kaj elekti, kio plej konvenos al li/ŝi. Forgesu pri vi mem kaj memoru, ke en viaj manoj troviĝas unika estaĵo, kiu neniam ekzistis en la mondo. Kia li/ŝi estos? La vivo montros. Do helpu al li/ŝi kaj atendu – li/ŝi mem elektos sian vojon.

Stano Belov
stanobelov.blogspot.com